Heinrich Heine,

Al brusto, al mia

tradukita de Leopold Blumental

Al brusto, al mia – ha, ĝi min doloras,
Almetu maneton, amata knabino!
Vi aŭdas, ke tie meblisto laboras?
Li por mi la ĉerkon konstruas sen fino!

Ha, kiel li frapas en mi en la koro!
La vivo forkuras, ne estas jam por mi . . .
Rapidu, rapidu kun via laboro.
Ke povu mi foj' je eterne ekdormi.

Traduko de la Germana poemo "Buch der Lieder, Junge Leiden, IV" de HEINRICH HEINE *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* LEOPOLD BLUMENTAL *(Leo Belmont, ∗1865-03-08 – †1941-10-19).*

Arg-705-2109 (2014-06-02 22:48:12)

Tiu ĉi poem-esperantigo troviĝas en la retejo `http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php`*, do en la Fundamenta Krestomatio.*